## Saluton!

"Kion vi faras dum silvestro?". Tiun demandon mi ofte aŭdas, kvankam la respondo estas tiom simpla kiom memkomprenebla: La IS okazos - apenaŭ aliaj eblecoj ekzistas. Nur ĉi tie oni povas ĝui kaj etosplenan silvestron kaj bonkvalitan tagan, vesperan kaj noktan programon dum la tuta semajno.

Kadre de nia temo "**Ekstremismo - specoj, originoj, efikoj**" ni diskutos pri la diversaj formoj de ekstremismo kiel ekzemple ekstrema politiko, religio aŭ sporto. Ankaŭ interesos nin de kie ili venas kaj kiel ili ekiĝas. Plie ni volas rigardi al la konsekvencoj de la formoj de ekstremismo. Se oni volas kontraŭbatali kelkajn formojn, kiel oni plej bone faras tion?

Ĉijare la Internacia Seminario okazos en la plej malnova urbo de Germanio - Trier. Kiel vi dekstre povas vidi, ĝi situas en la okcidento de Germanio. Kiel vi dekstre ne povas vidi, tio estas la fama vinregiono "Mosel" kaj tie estas belega kaj komforta junulargastejo kun duŝo kaj necesejo en ĉiu ĉambro. En la subtera etaĝo troviĝas belega trinkeja salono kie ni povas amuziĝi ĉe biero aŭ vino el la regiono. Sed tio estas nur kelkaj de la avantaĝoj de tiu ĉi ejo.




en la nomo de KKRen (la organiza teamo)
Till Schönberner


Wir danken dem Bundesministerium für Familie, Senioren, Frauen und Jugend für die freundliche Unterstützung!


## ADRESOJ

**Aliĝilon al:** Martin Sawitzki, Max-Planck-Ring 8d / L 56, D-98693 Ilmenau
tel.: +49 / 36 77 / 84 45 05
rete: is.admin@esperanto.de

**Taga programo:** Christof Krick, Taubenweg 25, D-33102 Paderborn
tel.: +49 / 52 51 / 31 00 73
rete: is.tema@esperanto.de

**Vespera programo:** Moritz Scheuermann, Wilhelm-Dorn-Str. 17, D-24536 Neumünster, tel.: +49 / 43 21 / 43 207
rete: is.vespera@esperanto.de

**Antaŭpagon al:** ĉiam kun indiko "IS 2002/3" + *via nomo*
por Germanoj al Bank für Sozialwirtschaft
(bankokodo 251 205 10), konto 84 24 900
por eksterlandanoj al Postgiroamt Dortmund
(bankokodo 440 100 46), konto 1352 42-467
Aŭ (nur ĝis oktobro!) al la konto de GEJ ĉe UEA, kodo GEJU-H

**IS-hejmpaĝo:** http://www.internacia-seminario.de
eblas aliĝi rete

## KOTIZOJ (ĈIUJ PREZOJ EN EŬROJ €)

**PLENPAGANTOJ:**

| aĝo je 27.12.02 | aliĝo antaŭ 01.10.02 | aliĝo antaŭ 01.12.02 | poste/ surloke |
|---|---|---|---|
| ĝis 20 jaroj | 128 | 142 | 172 |
| 21-26 jaroj | 152 | 172 | 212 |
| pli ol 26 jaroj | 182 | 202 | 232 |

Rabato por plenpagantaj
**B-landanoj:** 30
**C-landanoj:** 40

**MEMZORGANTOJ:**

| aĝo je 27.12.02 | aliĝo antaŭ 01.10.02 | aliĝo antaŭ 01.12.02 | poste/ surloke |
|---|---|---|---|
| ĝis 26 jaroj | 65 | 75 | 85 |
| pli ol 26 jaroj | 110 | 120 | 130 |

Rabato por memzorgantaj
**B-landanoj:** 40
**C-landanoj:** 50
**pli ol 26 jaraj studentoj kun internacia legitimilo:** 20

**Kategorio A:** Aŭstrio, Belgio, Britio, Danlando, Finnlando, Francio, Germanio, Irlando, Italio, Liĥtenŝtejno, Luksemburgio, Monako, Nederlando, Norvegio, San Marino, Svedio, Svislando, Vatikano
**Kategorio B:** Andoro, Ĉeĥio, Grekio, Hispanio, Hungario, Kanado, Kroatio, Malto, Pollando, Portugalio, Slovakio, Slovenio, Usono
**Kategorio C:** ĉiuj ceteraj landoj

**Rabatoj por programkontribuantoj:** 15 por la unua kontribuo, 8 por ĉiu plia, 5 por sendi la tiucelan kompletitan formularon kun foto antaŭ la 01. 10. 2002.

**Krompagoj por:**
- Germanoj kiuj ne estas ordinaraj membroj de GEJ/GEA 30
- invitletero (peto devas esti alveninta ĉe ni ĝis 01.11.2002!) 5
- dulita ĉambro (je enloĝanta persono po) 20

# Bonvolu legi la kondiĉojn sur la sekva paĝo!

## Aliĝilo por la 46a Internacia Seminario de GEJ

Bonvolu skribi latinajn presliterojn!

Persona Nomo: ______________________ ❑ ina ❑ vira

Familia Nomo: ______________________ nask.: __________
tago/monato/jaro

Adreso: ______________________
strato
______________________
poŝtkodo, urbo kaj loĝlando

Telefono: ______________ Telefakso: ______________
internacie internacie

Retpoŝto: ______________ ❑ Mi deziras retan konfirmilon (anstataŭ paperan)

Profesio: ______________________

❑ Mi estas komencanto.

❑ Mi bezonas oficialan invitleteron por vojaĝi en Germanion (petu antaŭ 01.11.2002)
Pro tio mi donas mian pasportnumeron:
______________________

## Partoprenkondiĉoj
**La plena kotizo** inkluzivas la loĝadon kaj manĝadon en la junulargastejo, litotolaĵoj, programon kaj la silvestran bufedon.
**La kotizo por memzorgantoj** inkluzivas la loĝadon en amasloĝejo, la programon kaj la silvestran bufedon.

## Atentigoj
Eblas partatempa partopreno: la kotizo estas la plej alta kotizo en via aĝkategorio dividita per ses kaj multobligata per la nombro de partoprentagoj. **Rimarku ke parttempa partopreno en la junulargastejo eblas nur se ne ĉiuj litoj jam estas rezervitaj por plentempaj partoprenantoj!** Parttempaj partoprenantoj do estu pretaj loĝi en la amasloĝejo kaj provizore kunportu dormosakojn kaj aermatracojn!
Vi povas certi pri lito nur se vi frue aliĝas kaj ricevas konfirmilon de ni. Via antaŭpago estas transdonebla al alia persono se vi skribe anoncas tion. Ni alĝustigas la kotizon, kiu ne povas malaltiĝi.
Por junaj familioj ekzistas la paralela renkontiĝo "Internacia Festivalo". Informoj ĉe http://www.internacia-festivalo.de

## Kiel aliĝi
La aliĝo de A- kaj B-landanoj ekvalidas nur post **alveno** de antaŭpago per kontoĝiro aŭ monbiletoj en Eŭroj (sendo je via propra risko!). La antaŭpagsumo estas por **A-landanoj 30 EUR** kaj por **B-landanoj 10 EUR**.
La aliĝo de C-landanoj ekvalidas post la alveno de la aliĝilo.

**Bonvolu nepre kunporti pruvilon pri via antaŭpago!**

- ❑ Mi ŝatus manĝi vegetare
- ❑ Kiel memzorganto mi ŝatus loĝi en amasloĝejo, se ekzistas tia.
- ❑ tuttempa partopreno
- ❑ partatempa partopreno de ____________ ĝis _________

Mi ŝatus en ❑ unuseksa/❑ gea ĉambro loĝi kune kun: ____________________________
❑ Mi mendas 2-litan ĉambron (limigita kvanto - krompago je persono po 20 EUR ).

Mi pretas kontribui al la...
❑ tema programo per ______________________________________________

❑ distra programo per ______________________________________________

❑ vespera programo per______________________________________________

❑ muzika vespero kaj pro tio kunportos la sekvan muzikilon:______________________

Rimarkoj: ______________________________________________________________

Por A- kaj B-landanoj: Precipe mi konscias pri tio ke mia aliĝo validas nur post la alveno de mia antaŭpago ĉe GEJ.

Dato:_______________ Urbo:_______________ Subskribo:____________________________

La Germana Esperanto-Junularo invitas vin al la

# 46a Internacia Seminario

27.12.2002 - 03. 01. 2003 en Trier



# EKSTREMISMO

## ——— specoj, originoj, efikoj